

T. COMBE

---

# DANKON

---

EL FRANCA LINGVO LIBERE TRADUKITA


DE

E. RAMO



ĀCETEBLA :

EN LA LIBREJO EGGIMANN, 1, RUE CENTRALE  
AŬ ĈE LA TRADUKINTO, 19, BOULEVARD PONT D'ARVE  
ĜENEVO (SVISUJO)



T. COMBE

---

# DANKON

---

EL FRANCA LINGVO LIBERE TRADUKITA

DE

E. R.





821.133.1-3=922

## DANKON

---

En la tempo, kiam Emilo Rousseau (elparolu: «Ruso») estis juna laboristo, li multe pripensis pri la tiam akceptitaj, socialaj teorioj. Kaj de tiu tempo la rezonaĵoj eltiritaj el tiuj teorioj fariĝis regulo de lia vivo.

Ni ne intencas ĉi tie analizi ĉiujn siajn opiniojn; ĉar ili enŝlosis lian tutan ekzistadon kvazaŭ per alta barilo, kiun tiu logika homo neniam transpaŝis.

Hodiaŭ interesas nin nur unu punkto, pri kiu lin malaprobis eĉ liaj samideanoj.

De sia dudeka jaro li decidis neniam plu uzi la vorton: « dankon ». « Por libera homo », li diris, « ĝi ne estas inda vorto. Ĝi estas esprimo de sklavema spirito. »

Tamen malfacile forigebla estis tiu malnova kutimo diri: dankon! Pacience, persiste, li ĝin elradikigis. Kiam do la mastro pagis al li la duonmonatan salajron, li rimarkis: « Estas ĝuste. » Se oni alportis al li gladitan tolaĵon, li aprobis: « Bone. » Se oni faris al li

servon, li diris: « Kiam mi povos, ankaŭ mi same agos por vi. » Kaj tion li neniam forgesis fari, ĉar li estis vere servema kaj sindona.

Li edziĝis. La edzino, apud siaj gepatroj, ne estis havinta tre feliĉan vivon; kaj nun, ŝi multe admiris sian edzon pro lia honesto vivo kaj ĉiama celado al justeco. Pri formoj ŝi malofte pensis. — « Estas ja malgrava afero forigo de unu vorto, eĉ de vorto konsiderata kiel ĝentila! » Pri la edukado de siaj infanoj, ŝi neniam kontraŭstaris sian edzon. La infaneto ne lernis alstreĉi sian maneton balbutante: « dankon! », kiam ĝi ricevis la deziritan frandaĵon.

— » Tion vi donas al ĝi », diris la patro, tial ke vi estas la patrino; en estonta tempo, siavice, li same agos por vi, ĉar li estas via filo. *Mia* devo estas labori por la infanoj, ĉar mi edziĝis je vi kaj donis al ili la vivon. Tio ĉi estas simpla justeco. »

En la lernejo, tamen, la Rousseau'a infanaro lernis la malpermesitan vorton. Pli ol unufoje ili ĝin diris, sed senpense aŭ skeptike. Ĝermadis la instruo de l' patro. Simple kaj oportune estas ja diri al si: « Oni ricevas kion oni *rajtas* ricevi; oni donas, kion oni *devas* doni. » Kiam, devigate, ili diris « dankon » — ĉar ĝentileco ĝin ankoraŭ postulis — ili ĝin diris mallaŭte; la vorto estis sensignifa por ili.

« Lecionojn la instruisto ŝuldas al ni; kial lin danki? La poŝtisto ŝuldas al ni siajn servojn; kial do diri:

« dankon », kiam li alportas al ni la leterojn? Kulpa li estus, se li ilin ne alportus. Ni diras: « bone », kiel la patro. Tio sufiĉas. »

La patrino kelkfoje malkvietiĝis, kiam ŝi rimarkis, ke ŝiaj infanoj konsideris socialajn rilatojn nur kiel justajn intersanĝojn. Sed ŝi pensis: « negrava afero, estas ja nur vorto! Tute egale diri « bone » aŭ « dankon », se nur nia koro estas dankema. »

Ŝi mem estis dankema, la bona amanta kreitaĵo! Ŝi multe ŝatis la servojn faritajn al ŝi de ŝia unuenaskita filo. Tiu ĉi Antono multe similis al la patro. Kia rezonisto, kia rigida logikisteto! Kiam la patrino estis laca, li anstataŭis ŝin, farante ian ajn laboron; jen li ŝovis benketon sub ŝiajn piedojn, jen li kuris por alporti al ŝi fadenvolvaĵon teren falintan. — « Dankon, Antono », ŝi tiam diris, nepenseme. — « Ne, patrino, diru: Bone! kiel la patro. Mi nur volas fari tion, kio estas justa, ne pli. »

La dua filo estis senenergia knabo. Sen kompensado li akceptis servojn. La tria ne havis ameman karakteron. Fine, la knabino, karesa kaj amanta, multe admiris la patron kaj kore amis la patrinon. Ŝi servis siajn fratojn, tute malŝatante la leĝon de intersanĝoj.

Stranga familio, en kiu estis nekonata la dankeco!

Verdire, estas aliaj familioj, en kiuj aŭdiĝas sennombraj, nesinceraj esprimoj de dankeco, sed ĉe kiuj mankas la varma, reala sento de dankeco.

Nu, en tiu familio, en kiu oni neniun dankis, nek Dion nek homojn; en kiu preciza justeco estis la fundamento de ĉiuj rilatoj, en kiu dankemo estis rigardata kiel sklava sento, kaj kie la sola regulo de la vivo estis doni, kion oni devas doni; en tiu familio okazis, unu tagon, ke al la familiestro farigis neeble redoni tion, kion li ŝuldis!

Jam de kelka tempo, Rousseau estis suferanta pro malsano, kiu ĉiujn malkvietigis. Laŭvice turmentata per akutaj doloroj kaj denove kvietiganta, la malsanulo devis suferi operacion, kaj, sekve, loĝadi en malsanulejo. Spite la petoj de sia edzino, Rousseau rifuzis privatan ĉambron:

— « Kio estas taŭga por aliaj laboristoj estas taŭga por mi, ne vere? »

Komence, li fartis sufiĉe bone, sed, tri aŭ kvar tagojn post la operacio, loka brulumo ekvidiĝis. Febro, sufero, sendormo turmentis la malfeliĉulon. La malsano daŭris pli longe ol li pensis. La fratino-flegistino, kiu zorgis pri la malsanuloj de tiu ĉambro, devis doni al li specialan flegadon. Vidante lin malkvieta kaj turmentata per funebraj antaŭsentoj, ŝi pli ofte venis por kuraĝigi lin. Nokte, kiam li febre eksaltis kaj laŭte ekkriis pro teruriga sonĝo, apud li staris, klinanta, la flegistino, kun paca vizaĝo, subtenante lin kaj aranĝante la kapkusenojn.

— « Iru dormi, fratino », li murmuris, febre pasigante

la manon sur sia frunto. « Vi bezonas ripozon; krom tio estas la vico de la nokta flegistino. » — Jes, sed ŝi ne metas la kusenojn kiel vi deziras; plie, mi volas iom ri-proĉi vin, ĉar vi malkvietiĝas. Tio pliigas la febron. » — « Sed, vi scias... », li murmuris. — « Jes, mi scias... Estas nenia danĝero en via stato. La kuracisto ĝin certigas. Via imago timigas vin. » — « Vi estas certa pri tio? » — « Absolute. » Emilo Rousseau kredis, ke lia malsano estas kankra. Tiu terura penso lin turmentegis.

La fratino, dolĉa, nelacigebla, ĉiam ripetis al li la vortojn de l' kuracisto kaj ĉiufoje trankviligis lin.

Kiam fine, Emilo Rousseau resaniĝis, li tre hontis pro sia senkuraĝeco. Ĉu li forgesis, ke malsanulo pli malpli similas infanon?

« Mi estis tre malsaĝa », li tiam diris al la flegistino: « mi vin multe tedis kaj ĝenis. Nun, fratino, ion vi devas klarigi al mi. Tage kaj nokte vi flegis min. Pro mi vi senigis vin je dormo eĉ post via labortempo. Mi scias, ke por tio oni ne pagas vin. Ĉu vi, kiu kredas al la Paradizo, ĉion tion faras, kiel spekulacion por aĉeti bonan lokon en la Cielo? » —

La fratino ekridetis.

« Tiajn kalkulojn ni ne faras! » —

« Kial do? » persistis Emilo Rousseau. « Mia edzino, mia filino... mi permesas ke ili agu sindone kontraŭ mi; ankaŭ mi laboras por ili. Sed vi nenio al mi estas! Tio kontraŭstaras mian sistemon. » — « Kian sistem-

on? » demandis la fratino. — « Bonegan sistemon de justeco, kiu simple konsistas el tio ĉi: Redoni unu al la alia tion, kion oni al si ŝuldas reciproke; nenia favoro, nenio servemeco! . . . De l' tempo, kiam mi estis dudekjara, mi al neniu diris « dankon ». Pri tiu vorto, mi tute decidis plu neniam ĝin uzi. » —

« Tion mi rimarkis », ridetis la fratino. — « Vi trovis min malĝentila », aldonis Rousseau — « sed tio ne estas la kaŭzo. Mi sentas kiom mi ŝuldas al vi — tio embarasas min. Se mi ne eltrovas rimedon por kompensivian laboron, tiam mia sistemo de justeco estas neniigita. Kompreneble mi pagos por la tagoj pasigitaj en la hospitalo, mi eĉ povas lasi donacon al tiu ĉi domo, sed vi el tio nenion ricevos. Kion fari? » —

— « Eble konfesi, ke via sistemo ne estas tute taŭga? » — proponis la fratino, malatente, ĉar alia el la malsanuloj ekscitigis.

Emilo Rousseau ĉiel konsideris kaj pripensadis la problemon, sed ne trovis ian solvon.

— « Fratino, li diris ĉe sia foriro, « vi estas tre bona. Mi ne diras al vi « dankon », ĉar tio estus kontraŭ mia sistemo de justeco. Mi ankoraŭ iom pripensos, en mia domo; eble mia sistemo ne taŭgas en okazo de malsano. » —

— « Justeco estas admirinda; tamen ĝi ne sufiĉas », diris la fratino. —

— « Justeco ne sufiĉas! » — Tiuj vortoj longatempe

resonis en lia orelo. « Nesufiĉa, . . . tiu mezuro preciza, ĝusta, akurata kiel pesilo, mezuro egala por donaĵoj kiel por ricevaĵoj? »

« La fratino havas poezian animon », li pensis. « Ŝi ne rezonas — tamen mi certe dezirus doni al ŝi kompensaĵon pro ŝia penado . . . »

Post lia alveno hejme, kelkaj detaloj, kiujn li nun atente konsideris, iom malkvietigis lin.

Li vidis, ke en lia mastraĵo justeco ne estis tiel akurata kiel li pensis. Ekzemple: lia edzino laboradis pli ol li mem: lia filino faris pli da servoj al siaj fratoj ol ili al ŝi. Por la unua fojo, Rousseau malkontentigis.

Oni festis per festeneto la revenon de la resaniĝinta patro. Ĉiu vizaĝo brilis, kiam la patro residis en la kutiman lokon ĉe la familia tablo. Post la manĝo, la familio kunigis ĉirkaŭ la lampo; S<sup>mo</sup> Rousseau, kies okuloj iom malfortigis, trikadis; ŝia filino, ekpreninte ŝtrumpetojn, riparis eluzitajn maŝojn. La plej maljuna filo, desegnis ilon; Cezaro, senokupe, oscedis (li pli satis la straton ol familian kunvenon). Fabiano legadis.

— « Kion do vi redonas al via fratino interŝanĝe pro tiuj ŝtrumpoj plibonigitaj de ŝi? » demandis, subite, la patro. « Same, kiel vi, ŝi rajtas ripozi. Via labortempo estas dekhora; ŝia laboro daŭras dektri aŭ dekkvar horojn. En tio ĉi ne estas justeco. »

La plej maljuna filo, neniam indiferenta pri justeco, levis la kapon. « Estas ja necese ke iu riparu miajn

ŝtrumpojn », li rimarkis, penseme. « Sendube, mi devus pagi, ... sed ... mi nenion gajnas ankoraŭ ! ... Mi pagos poste? » li aldonis, ridante. — « La patro ŝercas », ekridetis lia fratino. « Li scias, ke mi plezure plibonigas ŝtrumpojn. Estas mia devo. » — « Hm! » murmuris Emilo Rousseau, enpensigante pro tiu nova problemo ... « Mi opinias », li diris post kelkaj minutoj, « ke via fratino donas al vi pli ol ŝi interŝanĝe ricevas. Ĉar, sume, ŝi ne ŝuldas al vi pli ol vi ŝuldas al ŝi ... Kion vi diras al via fratino, kiam ŝi plibonigas viajn vestojn? » — « Nu », respondis unu, « mi diras: « Bone, ŝovu ilin en la tirkeston! » —

« De longe mi estas pensanta », rimarkis dolĉe la patrino, « ke almenaŭ ili devus ŝin danki. »

« Ne. Ni serĉu rimedon per justeco », respondis Emilo, iom kolerante pro la malnova formulo kaj antikva sento de dankemo, kiu ree proponiĝis kiel solvo ...

En tiu momento aŭdiĝis la vestibla sonorileto. Eniris la domposedanto, venante por gratuli siajn bonajn luanantojn pri la resaniĝo de Rousseau. Li estis viro rigida, honesta, ŝparema, kiu estis gajninta iom post iom, per sia laboro, monon sufiĉan por aĉeti la domon. Li estis timinda observisto, kiu riproĉis al la infanoj unu makulon en la ŝtuparo, unu grataĵon sur la gipso.

Dum oni interbabiladis, S<sup>ino</sup> Rousseau timeme rimarkis: « Hodiaŭ matene mi vidis Liza'n Bandelier. Ŝi multe ĉagreniĝas pro sia baldaŭa foriro. » — « Nu,

kion vi volas! » bedaŭris Sinjoro Moulinet, la domposedanto. — « Ŝi estas certa, ke ŝia edzo sendos al ŝi monon la proksiman monaton. » — « Estu certa pri tio! ... la proksiman monaton?! ... neniam, neniam! ... — Li skribis, ke li komencas gajni monon tie, en Ameriko... » — « Ju pli mi atendas, des pli mi perdas... » koleris S<sup>ro</sup> Moulinet, kies basa voĉo nun sonis kiel tondro. « S<sup>ino</sup> Bandelier ŝuldas al mi tri monatojn. Apenaŭ ŝi havas sufiĉe da posedaĵoj por lasi al mi garantiaĵon por trimonata lupago. » —

« Jes », diris S<sup>ino</sup> Rousseau, kuraĝigante. « Ŝi diris al mi, ke vi devigas ŝin lasi sian poŝhorloĝon, sian broŝon, siajn dekdu kuleretojn » ... —

« Entute kvardek frankojn », finis S<sup>ro</sup> Moulinet. « Se mi devus vendi tiujn aferojn, mi ne ricevus la duonon ... ne. Sed ŝi multe ŝatas tiujn ajetojn — memoraĵojn ŝi ilin nomas — sekve ŝi ilin reprenos tuj kiam ŝi povos, kaj tiel, mi ricevos mian monon. — Sed ŝin pli longe lasi en la domo, tute ne! Ŝi plendis al vi? ... nu, bone. Tio tute decidigas min ... » — « Ho, vi scias ... la hontigo ... esti forsendita el la domo ... por fiero persono ... Kaj ŝi ŝatas sian loĝejeton. Translokiĝo estas serioza afero. Tre fortika ŝi ne estas ... » — « Ĉion tion ŝi devis skribi al sia edzo. Li rapidu, tiu homo! En Ameriko, eĉ nur kliniĝante oni monon kolektas! » — « Tamen, mi certigas vin » ... , persistis S<sup>ino</sup> Rousseau. — « Kaj mi certigas vin, miaflanke, ke mi havas la rajton postuli la



monon. Oni ŝuldas al mi trimonatan lupagon. Mi diras: Foriru, kaj lasu garantiaĵon. Mi videble indulgas ŝin, ĉar mi povus vendigi ŝian proprajn devige... Ha! ŝi ne estas kontenta?... Se mi, kiel domposedanto, estus sentema kiel via edzino, ĉu vi scias, en kia stato mi estus? » —

« En mizero vi estus », diris Cezaro. — En laboristaj familioj, oni ne havas la kutimon sendi infanojn en la liton, kiam oni diskutas pri plenaĝulaj temoj.

« Tre vere, mia knabo, mi estus en mizero », rediris la domposedanto al sia juna alparolanto.

« Vi, Cezaro », riproĉis la patro, « vi preterlasis belan okazon silenti. » —

« Se mi ne ricevas mian lupagon, kiel do mi devas pagi la impostojn kaj riparojn? » daŭrigis S<sup>ro</sup> Moulinet. « Kio estas justa estas justa. Vi mem ĝin centfoje ripetis, S<sup>ro</sup> Rousseau. » —

« Perfekte. Kio estas justa, estas justa », diris Emilo; li tamen estis tiel malkvieta, ke ŝvitgutoj ekbrilis sur lia frunto. — « Sed, pri S<sup>ino</sup> Bandelier »... —

« Por S<sup>ino</sup> Bandelier kiel por mi, kio estas justa estas justa. La domo apartenas al mi; por tie logi oni devas pagi... Ŝi ne pagas; mi diras al ŝi... » —

« Jes, jes, tion mi scias », interrompis Emilo, kun ia eksciteco. « Sed ĉu ne estas alia rimedo?... Mi trovos... » li konkludis subite. — « Kiel plaĉas al vi », respondis S<sup>ro</sup> Moulinet, starigante. « Se vi intencas garan-

tii por ŝi aŭ prunte doni al ŝi la sumon, vi malpravas, laŭ mia opinio. Tio jam ne estas justeco. Pri viaj infanoj vi unue devas zorgi. Vi multe elspezis en la hospitalo. » —

Pri aliaj temoj oni poste parolis.

La sekvantan tagon juna, delikata virino, kun agrabla vizaĝo, rapidmове venis al S<sup>ino</sup> Rousseau. Ŝiaj grandaj brunaj okuloj brilis per larmoj. Ĵus estis finita la tagmanĝo. En la ĉeesto de la familio, la juna virino sin turnis al la familestro. Neniam, ĝis nun, Emilo ricevis tiajn dankojn. La virino ploris pro kortuŝeco, ŝi deziris al li dian benon. « Mi tute ne povis ĝin kredi », ŝi ekkriis. « Kiam S<sup>ro</sup> Moulinet diris al mi, ke ĉio estas pagita, mi rigardis lin kiel frenezulino. Estas bela sonĝo! mi pensis. Ho! mi mortus pro honto, se oni min estus forpelinta. Mia edzo ja promesas sendi ĉiumonate cent frankojn... Baldaŭ vi estos repagita; vi nenion perdos... Kiel do mi povas sufiĉe danki vin? »

La infanoj rigardis sian patron. Paŭlo, la plej pensema, estis iom amuzata per tio okazaĵo. « Tio malplaĉas al vi, patro! » li rimarkis, ridante.

— « Jes, tio dolorigas min. Mi petas, S<sup>ino</sup> Bandelier, ne danku min. Tio malplaĉas al mi. » — « Sed tiam... » ŝi haltis... « mi nenion alian povus fari ĵus nun, ol vin danki! » — « Ne, ne! »... li haltigis ŝin. Neniam lia klara, sistemamanta spirito estis tiel terure konfuzita.

Honeste, konscience, li studis, unu post la alia, la demandojn, kiuj sin amase premis en lia kapo. Dum kelkaj semajnoj li meditis. Fine fariĝis klareco en liaj ideoj.


Estante familiestro, Rousseau konsideris kiel sian devon komuniki al sia familio sian moralan eltrovaĵon. Unu vesperon li kunvenigis ĉiujn familianojn, kaj, iom didaktike kiel kutime, li diris :

« Mi devas konfesi al vi, mia edzino, kaj al vi, miaj infanoj, ke mi eraris pri justeco. Ĝi ne ĉiam sufiĉas. Ekzistas io super justeco. Ekzemple : la flegoj, kiujn mi ricevis en la hospitalo, estas super ĉia justeco. Ekzemple ankaŭ la laboro de mia filino por ŝiaj fratoj : aŭ ĝi estas sklava laboro, aŭ ĝi estas... kio?... la rezultato de boneco, kiu superas justecon. Senkulpigu min, se mi fine parolas pri jena alia ekzemplo : Praktikante nur precizan justecon, ni ne estus farinta al S<sup>ino</sup> Bandelier tiun malgrandan donacon, — tiun... pruntedonon... kiel mi nomos ĝin?... tiun malgrandetan servon. Mi ne scias, ĉu ian tagon nura justeco, eĉ praktikata de ĉiuj, sufiĉos en ĉiuj okazoj. Tiu tago ne jam venis. Dufanka estas la demando. Estas necesa unufanke kompato, boneco, dono senrepaga — nomu ĝin kiel ajn vi volas; aliflanke, ekvivalento estas necesa. Kiel doni kompensajon al tiuj, kiuj faras por ni pli ol ili ŝuldas? — « Estas tute simple », mallaŭte diris lia edzino. — « Jes, mi malpravas, kiam mi malpermesis al vi diri tiun vorton. Mi nun vidas, ke estas neeble seniĝi je dankem-

eco. Kiam ni ricevas pluaĵon nerepagotan, tiam devas esti ankaŭ pluaĵo en niaj sentoj kaj en niaj vortoj. Nia mondo estus malĝoja, rigida, malagrabla, se ne iam kaj iam ekbrilus farajoj pli amplenaj ol tiuj de justeco. — Nun, vi scias, pri ĉio tio mi ne pensas same kiel antaŭe. Kiam plaĉos al vi esti dankemaj, ne ĝenu vin. Mi same faros. Malfeliĉa mi estis, de l' tempo, kiam mi foriris el la malsanulejo sen ia dankema vorto al la fratino pro ĉio, kion ŝi faris ne devigate... Mi tre dezirus ĝin fari, sed mia sistemo malhelpis min. »

« Facile estas tion rebonigi », diris lia edzino kun larmplenaj okuloj.





espateko .

No 14589

**Książnica Podlaska**

im. Ł. Górnickiego w Białymstoku



**KP-F14-0002602**